

BELGA ESPERANTISTO

49a Jaro — N-ro 4a — Aprilo-Majo 1957a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktoro-Administranto:

la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Ora Jubileo

La Festoj de la Esperantista Brusela Grupo

La 10an de februaro 1907a starigis en Bruselo, kun tuja aliĝo de proksimume cent kvindek propagandistoj, nova societo „**PIONIRO, Brusela Grupo Esperantista**”.

Tiun 50an datrevenon, la nunaj posteuloj de la tiamaj pioniroj decidis festi solene kaj tiucele ili invitis la belgan samideanaron por festoj, kiuj okazis dimanĉe la 7a de aprilo.

Solena kunsido

Tiuj ĉi festoj komenciĝis per solena akademia kunsido en la nun vere bela kaj deca ĉiusemajna kunveno de la Grupo, la unuaetaĝa salono de la „Brasserie de la Justice”, apud la Saŭleta-preĝejo.

S-ro René Jacobs, prezidanto de la festanta grupo, prezidis la tablon, ĉe kiu kunsidis, dekstre, S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto, S-ro J. Plyson, vicprezidanto, kaj S-ro H. Sielens, ĝenerala sekretario de Rega Belga Ligo Esperantista kaj, maldekstre: D-ro Paul Kempeneers, honora prezidanto de la Grupo kaj la komitatanoj: S-ro Marg. Weyn, vicprezidantino, — kies nomo forfalis en la citado de la reelektita komitato de la Grupo en nia marta numero —, S-roj Jirousek kaj Schumacher, respektive sekretario kaj kassisto.

S-ro Jacobs memoriginta pri la similaj festoj en Antverpeno antaŭ nur kelkaj monatoj, bonvenigis kaj dankis la multnombrajn ĉeestantojn kaj speciale tiujn, kiuj venis el ekster la urbo.

Li iom detale skizis la historion de la Grupo, kiun ĉiuj partoprenintoj poste, kun plezuro, retrovis en la belleta broŝuro, skribita de S-ro Elly Staes kaj kiu tre trafe memorigas pri ĉiuj plej gravaj okazintaĵoj de la pasinta duonjarcento. Ŝi, same kiel S-ro M. Weyn, kiu prizorgis la tajpadon kaj multobligon, kaj S-ro Jirousek, kiu bele enkovriligis la tuton, meritas ĉies laŭdojn.

Laŭvice li honorigis ĉiujn jubilean-

tojn kaj veteranojn, inter kiuj ni speciale menciis D-roon Paul Kempeneers, kiu, dum tiom da jaroj, gvidis la Grupon kaj S-roon Elly Staes, la nuran ĉeestantinon kiu membris en la fondiĝjaro.

Post memorigo al la kara Panjo Staes, la prezidanto transdonis al la veteranino Elly Staes plej belajn florojn.

Tiam ekstaris D-ro P. Kempeneers, kiu, salutinte la jubileantan grupon, kiel prezidanto de B.C.K.E., tamen speciale volis paroli kiel honora prezidanto kaj prezidinto de la Grupo. Plej humorplene kaj amuze li memorigis pri diversaj epizodoj kaj okazintaĵoj el sia esperanta vivo kaj speciale pri la vivo en la grupo antaŭ proksimume kvaronjarcento.

Poste, kaj laŭvice, alportis salutojn al la jubileanta grupo: S-roj G. Van den Bossche, nome de „Belga Esperanto-Instituto”; Morris De Ketelaere, vicprezidanto de „La Verda Stelo”; Charles Poupeye, prezidanto de la Bruĝa Grupo; J. Koeune, nome de la Verviersa Grupo, kaj Coene, nome de la „Monda Palaco”, unu el la Grupoj aliĝintaj al la Brusela E.K.I.

Fine, estis ankoraŭ parolonta S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto de R.B.L.E., sed konstatinte ke la horo de nepara foriro al la urbdomo preskaŭ alvenis, tiu ĉi fakte rezignis la parolvidcon ĝis la festeno kaj nur atentigis pri la donacoj jam faritaj: libroj por faciligi la grupvivadon, nome de B.E.L., tablan flagegon kun grupa nomo kaj datoj „1907—1957”, nome de „La Verda Stelo” kaj bela sonorilo, nome de la Bruĝa Grupo al kiuj li aldonis nome de R.B.L.E., lukse ornamitan Orlibron, kiun la ĉeestantoj tuj inaŭguris.

Tiel la belga samideanaro kune prizorgis riĉan tablornamon por la kunsido de la jubileanta grupo.

S-ro M. Jaumotte ankaŭ transdonis, kiel cetere jam faris antaŭ li la diver-

Nia 5-a Beneluksa



NUN
URGAS
ALIGI

(Legu
detalojn
sur
paĝo 26)

saj parolintoj, belajn florojn al la gentila S-ro R. Jacobs.

La oficiala Akcepto

Ekzakthore kaj post mallonga promenado ĉiuj alvenis en la Urbdomo, kie ili estis bonvenigataj de la skabenino S-ro Van Leynsele, kiu senkulpigis la urbestron S-roon Cooremans; bonvenigis ĉiujn, gratulis la jubileantan grupon kaj deziris grandan sukceson al nia movado, en kiu ŝi vidas antaŭulo al la por-eŭropa movado; ĉar tre certe Esperanto devas kontribui al la plifortigo de la eŭropaj ligiloj en tiu ĉi kontinento, kie regas la plej granda lingva diverseco.

S-ro Jaumotte petis la permeson esperantigi la francelingvan paroladon de la skabenino, kiu tre atente aŭskultis kiam nia lingvo klare aŭdiĝis en la beleaga akceptsalono.

D-ro Kempeneers poste dankis la urbestaron pro ĝia afableco; memorigis pri la feliĉa, trankvila pra-tempo en kiu naskiĝis nia lingvo kaj poste ankaŭ la brusela Grupo, kaj fine petis la Skabeninon transdoni plej sincerajn salutojn al la Urbestro, al kiu la Grupo dezirus proponi la honoran prezidantecon dum ĝi esprimas la deziron

(Sekvo sur p. 26)



42-a Universala Kongreso de Esperanto

Marseille - 3-10 aŭgusto 1957 - Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo.
Telefonoj: P.Rado 55-46; F.Erreol 98-18.
Telegrafo: Esperanto.
Banko: James Rosa, Marseille.
Girkonto: Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15.

N-ro 5 OFICIALA KOMUNIKO Februaro 1957

LOTTERIO: Al la loterio inter la unuaj mil kotizintaj kongresanoj estu aldonitaj kiel novaj premioj kvin abonon al la gazeto „La Progreso”. La premioj nun atingas entute la nombron de 41.

NOVA KUNVENO: Loka Loĝio de la Rito „Droit Humain” invitas la framasonajn esperantistojn, apartenantajn al kiu ajn Rito, al kunveno dum la Universala Kongreso. Vin turnu al: Hypatie (Esperanto), 24 rue Armand Bédarride, Marseille, Francujo.

AKCEPTO: La Urbo de Marseille, kunlabore kun aliaj gravaj Institucioj en Marseille, akceptos regale la kongresanojn.

GAZETARA SERVO: La Kongresa Gazetara Servo, la plej ampleksa el ĝisnunaj, komencis sian informadan aktivecon.

POSTKONGRESA EKSURSO: La postkongresa ekskurso vizitos Korsikon, patrujo de Napoleono. La veturado okazos per aviadilo AIR FRANCE.

KONGRESA KASO: L.K.K. plu ne akceptas donacojn por la Kongresa Kaso. Donacintoj kaj donacontoj povas elekti inter la Literatura Kaso, Blindula Kaso kaj Adopta Kaso.

INFANA KONGRESETO: La Dua Internacia Infan-kongreseto, en la kadro de la Universalaj Kongresoj, akceptos dumtage infanojn naskigintaj inter la 1/2/1951 kaj la 31/12/1943. Laŭ skriba atesto de la gepatroj, la infanoj parolu Esperanton sufiĉe por interkomprenigi. La provizora programo antaŭvidas ekskursojn al teraj kaj maraj lokoj de la sunplena Provenco, ludojn, filmprojekciojn, k.t.p. Alĝikosto por la tuta semajno, inkluzive manĝojn, 3.000.— Fr. Por informoj vin turnu al s-ro F. Cadenel, 32 rue George, Marseille, Francujo.

TEATRAJO: Teatra trupo de Marseille kun artistoj el Parizo ludos en Esperanto la teatraĵon „Topaze” de Marcel Pagnol, membro de la „Académie Française”.

STATISTIKO: (ĝis fino de januaro): Alĝerio 1, Aŭstrujo 13, Belgujo 9, Brazilo 3, Britujo 50, Bulgariujo 5, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 18, Finnlando 10, Francujo 222, Germanujo 62, Hispanujo 18, Italujo 94, Jugoslavio 27, Japanujo 2, Maroko 4, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 28, Norvegujo 5, Novzelando 2, Pollando 3, Portugalujo 5, Saarlando 1, Svisujo 16, Svedujo 37, Usono 3. Entute 645 el 27 landoj (Pasintjare 1080 el 41 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

POSTKONGRESA EKSURSO AL KORSIKO (10-13 aŭgusto 1957)

La postkongresa ekskurso al la insulo de belecoj, Korsiko, lando de Napoleono, intencas doni al la kongresanoj la eblecon ĝui en kondiĉoj de granda komforto la naturajn ĉarmojn de tiu Mediteraneo, kiu estas simbolo en la tuta mondo de senkompata poezio.

La vojaĝo okazos per unuaklasa aviadilo AIR FRANCE kaj la ekskursantoj loĝos en unuaranga Hotelo, meze de trankvila parko, en Ajaccio. La programo lasas sufiĉe da libera tempo al la ekskursantoj, por ke ili laŭeble partoprenu en la diversaj distroj de la banlokoj: ĉefe la vesperoj povas esti ĝajgataj de la multnombraj spektakloj en la CASINO kaj en la tipe korsaj kafejoj, kie kunvenas la plejparto de la gitaristoj. Dumtage la belaj plaĝoj de Ajaccio proponas sin al plaĉa ripozo post la kongresaj laboroj. Speciala akompananto de la Kongreso sin okupos pri la deziroj de la vojaĝantoj.

Helsingör

La internaciaj feriaj kursoj okazos 21-28.7 1957

en la internacia alturnejo de Helsingör, Danlando, ideala feria loko. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

La 9a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso

okazos 11-17 V. 1957 en RIJEKA (Jugoslavio). Adreso: Rijeka, poŝtfako 35.

Aperis la dua oficiala bulteno, kiu enhavas allogan programon.

Sabaton, 10 aŭgusto

Foriro de Marseille dummatene per turisma aviadilo. Alveno en AJACCIO, enloĝigo en la Hotelo kaj tagmanĝo.

Posttagmeze: vizito al la urbo kun akompanado de loka gvidisto: Domo de Napoleono, Muzeo de Napoleono, Imperiestra Kapelo, Muzeo Flesch (kolekto de Korsikajoj) k.t.p. Promenado ĝis la Pointe de la Parata, de kie oni belege alrigardas al la Iles Sanguinaires (sangavidaĵoj). Reveno al la Hotelo. Vespermanĝo. Libera vespero.

Dimanĉon, 11 aŭgusto

Foriro matene. Veturado per aŭtobuso laŭlonge de la Route du Littoral al Cargèse, fondita de greka kolonio. Rigardado de la greka kaj latina preĝejoj. Alveno al Piana, kun ĝiaj mirindaj „Caianches”, idiliaj fjordetoj rokaj kaj kuriozformaj, ornamitaj de afrikaj kreskajoj, penetrantaj en la maron en la grandioza dekoracio de la Golfo de Porto, plongita en tre bela lumeco. Tagmanĝo en Piana aŭ Porto. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera vespero.

Lundon, 12 aŭgusto

Matenmanĝo. Libera Mateno. Tagmanĝo kaj foriro al „Circuit du Maquis”, montregiono, kie rifuĝis la banditoj, kiuj mortigis pro kaŭzo de honoro. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera vespero.

Mardon, 13 aŭgusto

Matenmanĝo. Libera mateno. Tagmanĝo. Alveno al la flughaveno Campo dell'Oro en Ajaccio kaj foriro al Marseille, kie oni alvenas en la vespero.

Prezo: inkluzive vojaĝon per aviadilo, restadon en Korsiko kun kompleta pensio, vizitojn kaj ekskursojn, akompanadon kaj impostojn 31.000.— francaj frankoj.

Tutmonda Esperantista Junular-Organizo

13-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

27 julio—2 aŭgusto 1957 — Villeneuve-les-Avignon Francujo

Honora Prezidanto: S-ro Soulier, urbestro de Villeneuve-les-Avignon.

Loka Kongresa Komitato

- S-ro Roger Motto, Rond Point de la Gare, Avignon (Vaucluse).
- S-ro Laurent, Urba Konsilanto, „Les Cigales”, Villeneuve-les-Avignon (Gard).
- F-ino Bonnafous, 6, rue de la Monnaie, Villeneuve-les-Avignon.
- S-ino Marie Blary, 9, rue Jean Jaurès, Arles (Bouches du Rhône).

Provizora Programo

Kongresejo: La Festa Salono de la Urbdomo, Villeneuve l.A., estos la kongresejo de la 13-a IJK.

Loĝado: La kongresanoj loĝos en lernejo (maksimume 100 personoj) kaj en religia seminariejo (en Avignon).

Pensio: La kongresanoj manĝos komune en la lernejo, en la religia seminariejo kaj en restoracioj.

Provizora Tagordo

Sabaton 27: Akcepto en la stacidomo de Avignon kaj en la urbodomo de Villeneuve. Diservoj.

Dimanĉon 28: Vizito de la urbeto Villeneuve.

Lundon 29: Tuttaga ekskurso al Pont du Gard, Uzès, Nîmes.

Vizito de la Roma amfiteatro kaj de la urbo.

Mardon 30: Fiksota.

Merkredon 31: Vizito de la historia urbo Avignon (Kastelo de la Papoj, muzeo, vidindaĵoj).

Ĵaŭdon 1: Tuttaga ekskurso tra Rodana valo kaj regiono: Orange (roma teatro), Aven d'Ornac (subteraj grottoj), Fontaine de Vaucluse (fama fonto).

Vendredon 2: Fiksota.

Sabaton 3: Foriro per vagonaro al Marseille.

Dum la restado la kongresanoj ĉeestotrajn prezentadojn en la kadro de la Festivalo de la Nacia Popola Teatro, en la Kastelo de la Papoj en Avignon. Versajne ili rajtos ĉeesti prelegojn pri Teatro, faritajn de la aktoroj mem.

Estas antaŭvidita prezentado de folkloro danegrupo regiona.

KOTIZO

inkluzive loĝadon, manĝojn, ekskursojn, enirkostojn dum vizitoj, enirprezon por la teatraj vesperoj en Avignon kaj transportadoj:

- A. Loĝado en komuna dormejo; komunaj manĝoj (maksimuma 100 personoj) Fr.Fr. 8.500.—
- B. Loĝado en komuna dormejo, manĝoj en restoracioj (maksimume 150 personoj) Fr.Fr. 9.500.—

C. Loĝado en religia seminariejo (unu-litaj ĉambroj); rekomendita por krabinoj - pensio en la seminariejo (maksimume 60 personoj) Fr.Fr. 9.500.—

C. Loĝado en hotelo kaj privata ĉambro (limigita) Fr.Fr. 13.000.—

Ne TEJO-anoj kaj ne aliĝintaj kongresanoj en la 42-a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille pagos 1.000.— Fr. pli.

LASTA LIMDATO

Anoncu vin antaŭ la 1-a de junio 1957.

PAGOJ

Oni devas pagi je la aliĝo antaŭpagon de la kongreskotizo de 2.000.— Fr.

Aliĝojn kaj pagojn oni sendu al:

— S-ro Roger MOTTO, Rond Point de la Gare, Avignon (Vaucluse). Poŝtĉekkonto: Roger Motto, Marseille 1290 86.

Pagojn akceptas ankaŭ la 42-a Universalaj Kongreso de Esperanto. Banko: James Rosa, Marseille.

Poŝtĉekkonto: Groupe Esperantiste n-ro 156 15.

KELKAJ INFORMOJ PRI LA KONGRES-URBO

Ĉe la bordo de la rivero Rhône (Rodano), vidalvide al la antikva urbo de la Papoj AVIGNON, kuŝas Villeneuve-les-Avignon (Villeneuve apud Avignon), konstruita dum la jaro 1293 ĉirkaŭ roka monteto, kie staris potenca fortikaĵo.

Kiam vi alvenas el Avignon, transirinte la larĝan riveron, vi povas vidi la turon de la reĝo Philippe le Bel, konstruita de 1293 ĝis 1307 por defendi la enirejon de la reĝlando, kiun ligis al la Imperio la antikva fama ponto St. Benezet, nun grandparte detruita. La fortikaĵo St. André superrigardas la urbon. Ĝi konsistas el ĉirkaŭantaj remparoj kaj posedas nur unu enirejon inter la masivaj ĝemelaj turoj, konstruitaj dum la jaro 1360. La malnova preĝejo estis fondita en 1333: interne oni povas admiri multajn artverkojn, inter kiuj belegan „Virgulino” el eburo de la 14-a jarcento.

Meze de la urbeto staras la „Chartreuse du Val de Benediction”, monaĥejo fondita en 1356 de la Papo Inocento la VI-a. Modernaj domoj disigas ĉe la enirejo de la malnova preĝejo kaj ĉe la monaĥeja peristilo. En la papa preĝejo oni povas admiri belegajn murpentraĵojn de la 14-a jarcento.

La urba muzeo estas vizitinda por rimarkinda primitiva pentrojo de franca pentristo (1453) kaj aliaj artverkoj. Apud la Muzeo, en la hospitala preĝejo

Kiel atingi la infanojn?

Tio estas la demando, pri kiu ni, esperantistoj, multe cerbumas por trovi la ĝustan solvon. Ĝenerala ni povas diri, ke estas du vojoj laŭ kiuj ni povos atingi la infanojn: la pere de la lernejo kaj 2e per de la gepatroj. Bedaŭrinde la unua vojo ofte estas bariro pro la jam tro ampleksaj programoj lernejaj kaj la malfavora sinteno rilate al nia afero de la instruaj instancoj. Ŝajne la dua vojo estas pli facile irebla sed ankaŭ tiam ni renkontas la malfacilaĵojn vere kontakti kun la gepatroj. Ni scias, ke jam multfoje oni klopodis atingi la gepatrojn pri nia lingvo okaze de la gepatraj kunvenoj, kiujn oni de tempo al tempo okazigas en diversaj lernejoj. Sed ofte ankaŭ tiam ni renkontas tie la samajn malhelpaĵojn, ĉar kiu decidas en la praktiko la gepatrojn en tiaj kunvenoj? La lernejestro! kaj se tiu ne sentas ion por nia lingvo, li facile povas malhelpi ke okazu prelego pri nia lingvo kaj movado en la aluditaj kunvenoj. Do, kion fari, se ankaŭ tiu vojo montriĝas barita? S-ro Makkink en Bennekom trovis tre simplan solvon. Lia infano vizitas la elementan lernejon kaj vizitos poste la mezlernejon. Ofte okazas, ke en lernejoj kie oni la infanojn preparas por la mezlerneja instrujo, oni okazigas kurso pri la franca lingvo por ke la infanoj jam iom sciu pri tiu lingvo antaŭ ol ili eniros la mezlernejon. S-ro Makkink nun vizitis la gepatrojn de kelkaj infanoj kiuj estas en la sama klaso kiel lia infano kaj proponis al la koncernaj gepatroj, ke ties infanoj kaj lia unue lernu Esperanton antaŭ ol komenci la lernadon de la franca lingvo, ĉar lerninte la internacian lingvon, la infanoj poste pli facile povos progresi en la lernado de moderna lingvo. Tio ja jam multfoje pruviĝis. Uzante nur ĉi tiun argumenton S-ro Makkink sukcesis akiri la konsenton de la gepatroj de po kvin infanoj kaj nun funkcias esperanto-kurso kun ses infanoj sub la samaj kondiĉoj kiel por kursoj en la franca lingvo.

Ni opinias ke valoras la penon se ankaŭ aliaj interesigaĵoj apliku la saman agmanieron.

F. Weeke.

jeto estas konservata la Maŭzoleo de la Papo Inocento la VI-a, la plej bela franca papa tombejo (1362), vera brodaĵo sur ŝtono.

La vizitantoj povas ankoraŭ vidi tra la urbo kelkajn ĉefepiskopajn palacojn, konstruitajn en la 14-a jarcento, riĉajn privatajn domegojn de la 18-a jarcento, skulptitajn pordegojn kaj murojn, kiuj atestas pri la pasinta fiera potenco de la Urbo.

5-a BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

NUN URGAS ALIGI

al la 5-a Beneluksa Kongreso ĉar la LKK bezonas viajn nomon kaj adreson por enpresigi en la *Kongreslibron*. Nur tiujna nomojn kaj adresojn de partoprenantoj, kiuj estas en la posedo de LKK antaŭ la 15-a de majo (kompreneble KUN la pago!) ni povas fiksi en la kongresa dokumentaro.

La kongresa kotizo nun estas ngd. 5,50 aŭ 77 b. fr. La nederlandaj partoprenantoj pagu prefere al p.ĉ.k. 65.76.64 nome de „Esperanto Eindhoven“, Schouwbroek 70. Belgaj partoprenantoj pagu ĉu al Fl.L.E., p.ĉ.k. 2321.50, Raapstr. 74, Gent, ĉu al R.B.L.E., p.ĉ.k. 3766.98, rue Jourdan 185, Bruselo.

Kongresejo:

Nia kongresejo estas hotelo „Limburgia“, Markt 14, Eindhoven, telef. 2960 (0 4900). Dum la kongresaj tagoj la tuta hotelo estas je dispono de la kongresantoj. Sabate la 8-a de junio ekde la 2-a p.m. oni tie povas ricevi siajn dokumentojn.

L.K.K. petas flagojn

Por ornamigi la kongresan salomon la L.K.K. petas alsendon de flagoj. Sekcioj kiuj disponas pri propra Esperanto-flago bonvolu ĝin sufiĉe frue sendi - ĝis la 1-a de junio laste - al la sekretario de la L.K.K.: s-ino F. J. Bos-de Pagter, Fockema Andreastr. 1, Eindhoven.

Akcepto de la kongresanoj

La kongresanoj kiuj alvenos vagonare en Eindhoven estos akceptataj en la halo de la nova stacidomo.

Kongresa programo

Ne estas eble jam nun publikigi la definitivajn programon de la 5-a Beneluksa Esperanto-kongreso. Por la provizora programo bonvolu legi la decembran numeron de ĉi tiu gazeto.

Interkona vespero:

Dum la interkona vespero LKK prezentos filmon pri Eindhoven, kiun la estraro de la urbo afable disponigis. Tiu ĉi ne tro longa filmo montras superriĝardon pri la gravaj ŝanĝoj de la „lum-urbo“ en la lasta tempo. Plue LKK aranĝos porsocietajn ludojn kaj grandan balon.

Diservoj

Detaloj pri la Diservoj por katolikoj kaj protestantoj, kiuj okazos je dimanĉmatene, estos publikigataj en la Kongreslibro.

Festvespero

Por la festvespero LKK akiris i.a. filmon pri la giganta entrepreno Philips. Kunlaboros vira ĥoro (okteto) kaj jonglisto. La aliaj programoj estos publikigataj en la Kongreslibro.

La granda tuttaga ekskurso

Kiel ni jam publikigis, la tuttaga ekskurso kondukos nin al Oisterwijk, vilaĝo en centra Brabant, konata pro ĝia naturo. La kosto por la ekskurso estas ngd. 8,25. En la prezo estas ĉio enkalkulita i.a. la kostoj por brabantanmanĝo. Oni ankoraŭ povas sin anonci. Personoj kiuj iras per propra veturilo povas aparte mendi la panmanĝon (ngd. 3,35).

Hotelservo

La Fremdultrafika oficejo en Eindhoven prizorgas la loĝadon en pluraj hoteloj en la centro de la urbo. Tamen bonvolu frue vin anonci por ke ni povu rezervigi vian ĉambron. Atentu: LKK povas prizorgi vian loĝadon nur post ricevo de via pago.

La autobusoj en Eindhoven

La enurbaj autobusoj en Eindhoven ĉiuj forveturas de centra transirplaco, kiu situas tuj apud la stacidomo al la ekstremaj partoj de la urbo: Woensel kaj Strip (en la nordo kaj nordokcidento), Gestel (okcidento), Stratum (suddo) kaj Tongelre (oriento). Preskaŭ ĉiuj linioj havas kvaronhoran servon. La prezo de simpla veturo estas ngd. 0,20; transirbileto (overstapkaartje) kostas ngd. 0,25. Kartoj por 7 veturoj prezas ngd. 1.—.

(Sekvo de p. 23)

ke li ankaŭ bonvolu proponi al la konsilantaro la bapton de iu brusela strato je la nomo de „Esperanto“ aŭ „Zamenhof“.

La skabenino tuj promesis transdoni tiun duoblan proponon; kaj S-ro Jaumotte ree resume tradukis la nacilingvan paroladon de la honora prezidanto.

Tiam sekvis detala vizito tra la riĉa urbdomo, dum S-ino Brunard, konservantino, donis ĉiujn klarigojn.

La Festeno

Kaj iom post la dektria horo, ĉiuj alvenis al la restoracio „L'Ecu de France“, kie atendis ilin bona festeno.

Preskaŭ tro malgranda estis la unua etaĝa salono por la proksimume sepdek kunmanĝantoj. Sed, post iom komplika altabligo, ĉiuj tamen komforte, ŝultro ĉe ŝultro, sidis inter a-

Veteranoj kaj jubileantoj

Ni sube presigas la liston de la veteranoj kaj jubileantoj, kiuj estis honorigataj dum la festoj en Bruselo.

Flanke de ĉies nomo, estas la jaro de esperantistiĝo kaj la nombro de membrecjaroj:

Veteranoj

S-ro F. Mathieux	1904 (47 j.)
S-ino Elly Staes	1905 (27 j.)
S-ro J. Alofs	1905 (28 j.)
S-ro J. Derks	1908 (50 j.)
S-ino P. Derks	1909 (49 j.)
F-ino Obozinski	1912 (46 j.)
S-ro M. Daems	1916 (38 j.)

Jubileantoj

S-ro L. Everaerts	1921 (37 j.)
S-ro H. Hart	1921 (37 j.)
S-ro L. Bas	1925 (33 j.)
D-ro P. Kempeneers	1926 (32 j.)
D-ro R. Maes	1926 (32 j.)
S-ro H. Castel	1926 (32 j.)
S-ino L. Castel	1927 (31 j.)
S-ro L. Genin	1927 (31 j.)
S-ino D. Kempeneers	1927 (31 j.)
S-ro E. Patiny	1928 (30 j.)
S-ino M. Daems	1929 (29 j.)
S-ro F. Swinne	1931 (27 j.)
S-ro A. Laurent	1931 (27 j.)
S-ro R. Demot	1931 (27 j.)
S-ro V. Lamberts	1931 (27 j.)
F-ino M. Kestens	1933 (25 j.)
S-ino J. Plyson	1933 (25 j.)

grablaj kunfestenantoj kaj baldaŭ ekregis la plej gaja atmosfero.

La menuo menciis:

Antaŭmanĝaĵoj

Supo

Ravioloj kun Kremoj

Kokidaĵoj „Ĉefduko“

Glaciigita Meringelo „Chantilly“

Kaj la tuto estis riĉigata per blanka kaj ruĝa vinoj, kunprezentitaj al ĉiuj aliĝintoj.

S-ro Jacobs, je la deserta horo, legis la multnombrajn telegramojn kaj leterojn kiuj alvenis el en- kaj eksterlando kaj transdonis belan florgarbon al S-ino D. Kempeneers, edzino de la honora prezidanto, post kio S-ro M. Jaumotte faris la nuran ĉetablan paroladeton.

Li varme gratulis la jubileantan grupon kaj avertis ke la jubileaj festoj ne jam finiĝis...Ili post la hodiaŭa vespero daŭriĝos post kelkaj monatoj...en Charleroi, kie la Grupo, en novembro, ankaŭ ekzistos de 50 jaroj!

Li sugestis ke la Karlareĝa Grupo organizu tiuokaze iujn festojn aŭ, se neeble ĉar en plena vintro, ke ĝi organizu la Beneluksan Kongreson, tiuhonore, en 1958! Propono al kiu S-ro Paulus, ĉeestanta ĉe la honortablo, tuj jese respondis.

S-ro Jaumotte konkludis sian alparolon per toasto al la du ĉeestantaj

Funebro

Prezidinto René Geerinck mortis en Sta. Nikolao

En sia 70a jaro, mortis en Sta. Nikolao, la 31an de marto, s-ro P. René Geerinck, konata de la tuta enloĝantaro de sia urbo, en kiu li, dum multaj jaroj, direktis Bankagentejon kaj de ĉiuj malnovaj esperantistoj.

S-ro R. Geerinck ludis gravan rolon surloke, inter la du mondmilitoj, unue, kiel vicprezidanto kaj, ekde 1927, kiel prezidanto de la Sta. Nikolao Grupo.

Ĝis sia morto, li estis delegito de U.E.A.

Ni prezentas al lia vidvino, al liaj gefiloj kaj genepoj niajn sincerajn kondolencojn.

prezidantoj: D-ro Kempeneers, kiu por la grupo povas ja esti la estinteco, sed glora estinteco, kaj S-ro R. Jacobs, kiu prezidas de nur iom pli ol du jaroj kaj reprezentas la estontecon, same brilas de la Esperantista Brusela Grupo.

Tiu ĉi toasto estis varmege kaj laŭte aplaŭdata.

La vesperfestoj

Digesta promenado rekondukis ĉiujn ĉirkaŭ la kvina horo, al la grupa kunveno, kie estis organizata grandparte gaja programo en la kabareta stilo kun kantoj, skeĉoj kaj teatraĵetoj, kaj aliflanke ankaŭ pianoludado kaj dancoj.

Al la efektivigo de tiu ĉi programo partoprenis la sekcio de la jubileanta grupo mem: S-ro D. van der Stempel, pianisto; la ĉarma fraŭlineto Nadine Baudour, filineto de membro, kaj kiu graci plena evoluis en du ĉarmaj dancoj; S-roj Weyn, Swinne, Jirousek kaj S-inoj M. Weyn kaj R. Huysmans, en „Evo kaj ŝia Pomo“ kaj F-ino R. Huysmans kaj S-ro Weyn, en „La ŝtelisto kaj la Fraŭlino“. Ankaŭ la sekcio kabareta de „La Verda Stelo“, Antverpeno, kaj tutspeciala F-inoj J. kaj M. Ameryckx kaj S-roj François Schellekens, Walter Van Nereaux kaj Jozef Vinck, kiuj prezentis naŭ plej diversajn numerojn, kaj fine, grupo de skotaj dancistoj, gvidataj de S-ro George Ross, kaj kiuj, — same kiel ĉiuj aliaj partoprenintoj kaj kiel la enkondukanto de la diversaj numeroj, S-ro Swinne, akiris vere belan sukceson.

Vigla dancado kun loterio, kun du riĉaj premioj, kiujn kunforportis...la prezidanto ka vic-prezidanto de „La Verda Stelo“, estis inda konkludo por vere plene sukcesintaj festoj, pri kiuj ankoraŭ longtempe memoros la bruselaj esperantistoj kaj ĉiuj en la lando, kiuj tiun tagon veturis bruselen.

L. R.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.

Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidentino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 22an de marto okazis radiofona disaŭdigo de „La Embusko“, en traduko de F-ino E. Van der Weken kaj kun la kunlaboro de F-ino Mimi Ameryckx kaj S-ro J. Vinck, kiuj lastmomente anstataŭis G-rojn van den Neste, malhelpatajn; F-ino Cl. Peeters kaj S-ro J. Verstraeten, jam kutimaj kunludantoj, kaj F-ino Elvire De Coene kaj S-ro Luc De Marré kiujn la prezidanto en sia ĝenerala dankvorto speciale gratulis okaze de ilia unua partopreno, same kiel S-ro J. Montmirail, kiu prizorgis ĉiujn teknikajn.

Dimanĉon, la 24an, grupo de gemembroj vizitis la novan Folkloran Muzeon, gvidata de S-ro Simons.

La 29an, la Kabareta Vespero devis pro ĝarva malhelpo de du ĉefkunludantoj, esti prokrastata. Ĝi estis anstataŭigata per „El la malnova Skatolo“, projekci-vespero por kiu S-ro R. Van Eynde kaj S-ro Jan Jacobs liveris la dokumentojn kaj la interesajn klarigojn.

La 5an de aprilo, S-ro De Marré ludis specialan rolon en la parolata ĵurnalo per sia astrologia rubriko, kiu, pro ĝia intereso, estos daŭrigata en la sekvontaj ĵurnaloj.

Dimanĉon, la 7an, dudekkvino da gemembroj partoprenis en la oraj jubileaj festoj de la Brusela Grupo.

La 12an helpis al la organizo de la amuzvespero F-ino Bl. Geers, per speciala konkurseto, kaj S-ro J. Verstraeten per rakonto pri jusfarita studvojaĝo al Germanujo.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijklei 4. je la 20.30a h. (1-e etaĝo).

Majo: la 3an: Parolata ĵurnalo; la 10an: Radiofona teatraĵo; la 17an: Dokumenta Filmvespero organizota de S-roj Hector kaj Willy Boffejon; la 24an: Debatvespero „Temoj aŭ autobusoj“; la 31an: Esperanto-Kabareta Vespero.

Junio: la 7an: Parolata ĵurnalo; la 8an, 9a, 10an: Beneluksa Esperanto-Kongreso en Eindhoven; la 14an: Raporto pri tiu ĉi Kongreso; la 21an: Radiofona Teatraĵo; la 28an: Distra Vespero.

Funebro

Ni, tiun ĉi monaton, speciale partoprenas en gravaj funebroj kiuj trafis nian malnovan membrinon S-inon Landerwijn, kiu perdis sian edzon, kaj la familiojn Ameryckx kaj Van Dessel, kiuj perdis patr(in)-on kaj avinon.

Al la tri familioj, niajn plej sincerajn kondolencojn.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 12an de marto okazis lasta kunveno en la grupa sidejo „Cornet d'Or“, ĉefe dediĉata al la disdono de la diplomoj al la partoprenintoj en la ekzameno pri elementa kapableco de la 26a de februaro. Akiris la diplomon kun plej granda aŭ kun granda merito: F-ino Liliane Vermeersch, F-ino Katrien De Schepper, S-ro Fernand Rosseel, S-ro Fernand Clauwaert kaj S-ro René Van Clevén.

La 19an, la grupo transloĝis provizore al sia somera kunvenojo „Concordia“, kie malfermiĝis nova kurso por kelkaj komentantoj, sub gvidado de la prezidanto, S-ro Ch. Poupeye. Post la unua leciono, estas aranĝata reciproka prezentado inter la novuloj kaj la pli malnovaj gemembroj.

Post la leciono de la 26a, aperis nova numero de la parolata gazeto kun kontribuoj de S-ro Ch. Poupeye pri „La afero de Mondo“, F-ino Is. Van Parys, pri la Kataj Festoj de Ieper, F-ino L. Vermeersch, pri „La ĉevaloj estis ebriaj“ kaj de F-ino M. Willems, pri „Tro multe da bonaj“.

Dum la dua parto de la kunveno de la 2a de aprilo, F-ino Yvonne Poupeye pre-

(daŭrigo sur p. 30)

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

Bonfarado- plej nobla agado!

Sendube en vilaĝo estas pli da kunlaboro inter la enloĝantoj ol en urbo. Unue ĉar la homoj preskaŭ ĉiuj konas unu la aliajn, due ĉar oni pli bezonas unu la alian ol en urbo.

Speciale sur bonfarada tereno oni multe kunlaboras (lernejaj festoj-por-maljunulaj ekskursoj k.t.p.)

Sed...oni ankaŭ povas sperti mala-grablaĵojn lernigajn. Tion mi rakontos al vi per sekvanta historieto:

Petro Rastilo estis simpla laboristo. Li loĝis en dometo apud la Verda akvo-muelilo. Krom ĉarman edzineton li havis kvar infanojn, la plej aĝa estis en la kvara klaso de la elementa lernejo — la plej juna rampis ankoraŭ ĉirkaŭ la patrinaj kruroj — do sufiĉe da laboro.

Dum longa tempo Petro estis laborinta ĉe farmistoj — sed poste li ne plu ŝatis tiun laboron. La fabriko allogis lin. Bona salajro — sabatpost-tagmeze libera-unuvorte bonega laboro.

Tamen prospero ofte emas daŭri mallonge. Okazis akcidento sur la fabrikeja tereno. Fera objekto falis kaj vundis la kruron de Rastilo.

Dum semajnoj la kompatindulo devis resti hejme. Kvankam li ricevis monon el la malsanul-kaso kaj estis asekurita kontraŭ akcidentoj, la deviga periodo de senlaboreco okazigis ekstraĵajn elspezojn.

Malprospero ofte alportas novan malprosperon. La edzino ankaŭ malsaniĝis kaj helpantino devis asisti la familion.

Pro tiuj aferoj la mastrumado ne iris orde — ĉirkaŭ la domo fariĝis haoso, en la ĝardeno oni ne laboris kaj la „kvaropo“ de tempo al tempo helpate de najbaraj geknaboj — mal-konstruis parton de la domo — vitrojn k.t.p.

Aĉeti karbon por la „venonta vintro ne estis eble, „kaj oni ankaŭ urĝe bezonas novajn kurtenojn“, konstatis najbarino.

Nun la genajbaroj ekagis. „Per listo ni kolektos monon por nia kompatinda familio Rastilo“ ili diris. „Ĉiu donu ion kaj per tio ni helpas.

La mono tre utilos por kurtenoj — karbono — riparado de la domo.“

Tiel dirite — tiel farite.

Elinjo Smit kaj Anjo Kluk kolektis la monon. Mi devas diri: Oni donis MALAVARE! Johano Knip — farmisto, kies laboristo Petro estis dum jaroj, donis kvindek guldenojn. Pro tio li ne plu havis sufiĉe da mono por kontante pagi mopedon, sed tio povis ankaŭ poste.

Karlo Stamp — la poŝtisto kontribuis dek guldenojn. „Sekvontan monaton mi povos aĉeti la ledan surtu-

Kruca kun Razaj

*Kruco kun rozoj,
Jen nia sort',
La homa vivo,
Laŭ Dia vort'.*

*Ne nur feliĉo,
Ne nur ĉagren';
Kruco kun rozoj,
„Per Dia ben'.*

*Kruco kun rozoj!
Goj' kaj dolor',
Ambaŭ ni portu
Kun vigla kor'.*

*La rozoj velkos,
Mi scias ĝin.
La kruco restos
Ĝis viva fin'.*

*Tamen, en peno
Kaj dum ĉagren',
Eĉ tiam restos
La flora ben'.*

*Plej etan floron
Prizorgu ni;
La krucon portu
Am', energi'.*

*La flor' ridetas,
Ridu al ĝi,
Kaj ne malbenu
La krucon vi!*

*Kvankam pereos
Eĉ ĉiu flor',
La frukto vivos
Je Dia glor'!*

*Libere laŭ P. A. de Genestet.
Tradukis Betsy Leopold.*

ton“, li pensis.

SinJORINO Kraft ne povis malhavi monon, ĉar ŝi intencis iri al la urbo por aĉeti novan pluv-mantelon; finfine ankaŭ ŝi oferis.

Ŝi ja konis Petron jam ekde la lernejaj benkoj...kaj tiam ŝi multe ŝatis lin, jes.. Ŝia plej aĝa filino donis spontanee du guldenojn, kiujn ŝi estis ŝparinta por ĉeesti opereton en Alkmaar najbara urbo.

Tiel okazis, ke je bela tago en la fino de septembro delegacio de la vilaĝo transdonis belan sumon al la surprizita familio en la nomo de la tuta komunumo. „Elspezu ĝin utile“, oni aldonis.

La ĝojo de la Rastila familio estis grandega! „NI NENIAM FORGESOS TION“, ili diris. Nu karaj geamikoj, ankaŭ la genajbaroj neniam forgesos!

Ĉar iun sabatvesperon — kiam Johano Knip kaj Karlo Stamp agrable parolis sur la vilaĝa ponteto pri ĉiutagaj aferoj — kiu ronkis preter ilin? Estis Petro Rastilo sur nova motor-

Kion kapablas Milionulo

Mi hodiaŭ volas prezenti al vi, unu el miloj da tiaj modernaj homoj, de la mondo tute nekonata: William Mellon el Arizona.

Li estas 37 jaraĝa, riĉega, multmilionulo en Dolaroj, li havas ĉarman edzinon kaj tri amindajn infanojn.

Tiu viro antaŭ dek jaroj — nur pro la plezuro, posedis grandegan ĉevalbredejon. Li posedis ĉasejon en Florida, plurajn vilaojn, nubskrapulon en Novjorko, kvar aŭtomobilojn...kaj tamen li sentis sin soleca kaj nekontenta.

Kaj tiam komenciĝis la historio. Do, antaŭ dek jaroj. Li legis biografion pri Albert Schweitzer, kaj faris eltrovaĵon: la faroj de homo igas lian vivon plene riĉa aŭ tute senvalora. Kaj li prenis decidon kiu mutigis lian edzinon pro mirego. Li iris al la universitato kaj studis medicinon; Post ses jaroj li akiris la kuracistan diplomon. Poste li vendis sian ĉevalbredejon kaj venigis arkitekton.

Tio okazis antaŭ tri jaroj. Li komisiis la arkitekton konstrui model-hospitalon sur la insulo Haiti, pro tio ke sur la insulo tiom da homoj malhavis la necesan medicinan prizorgon. Intertempe lia edzino akiris flegistinan diplomon. Li varbis kelkajn kuracistojn kaj flegistinojn, vendis siajn ĉasejon, vilaojn kaj nubskrapulon. La aŭtomobilojn li kunprenis kiam li forlasis la landon; ili povos servi kiel transportiloj por kuracistoj kaj flegistinoj. Antaŭ du monatoj, la „up to date“ hospitalo estis malfermata. Oni senpage disdonas la medicinan helpon al ĉiuj mizeruloj kaj suferantoj.

Tio elspezigas al Mellon la bagatelan sumon de po 200.000 Dolaroj jare. Sed li kalkulis ke li povos elteni tion dum lia vivo, ĝis kiam la mono elĉerpiĝos, almenaŭ kalkulante je normala vivloneco!

Fr. Arni.


ciklo, lia edzino malantaŭ li. Ili iris al la opereto en Alkmaar (tio pruvigis poste) Petro kun nova leda surtuto — ŝi kun pluvmantelo tute nova. Strange estis ke la duo tute ne rimarkis la oferemajn najbarojn. Nu, la tuta vilaĝo povis vidi ke Petro Rastilo UTILE elspezis la monon de la najbaroj!

Ankoraŭ nun aĉaj kurtenoj pendas antaŭ la fenestroj de la domo de Petro Rastilo. Tie ĉi kaj tie mankas vitroj... la kamentubo apenaŭ varmiĝas.

Kaj la gajnaboj de Petro vagas ĉifonvestitaj tra la vilaĝo, eĉ naztukoj mankas al ili.

Kion diras nun la najbaroj? Mi ne kuraĝas raporti tion!

Jan van Twuiver.



Elaera foto de la kastelo

Münchenwiler

En Münchenwiler apud Murten en tre bela regiono de Svislando okazos ĉi-jare la tria internacia kurso pri Esperanto kaj Geonismo, denove direktota de d-ro William Perrenoud. La kurso daŭros de la 20a ĝis la 27a de julio 1957 kaj kostas inkluzive de ĉio fr. sv. 98.—. Oni petu la kvarpaĝan prospekton ĉe Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstr. 12, Bern.

Gramofondisko en Esperanto

Universala Esperanto Asocio eldonis gramofondiskon (45 turnigoj en unu minuto), kiu enhavas la salutparolojn de la reprezentantoj de 23 nacioj. La sonregistrado estas farita en la inaŭgura kunsido de la Universala Kongreso en Bologna, kaj tiun meritplenan laboron plenumis helpe de magnetofona aparato s-ro Vilho Setälä, Helsinki. La daŭro de la disko estas proksimume 12 minutoj. Estas tre interese havi dank al la disko la eblecon en trankvileco ekster la festa atmosfero de la kongreso aŭskulti la tutan serion de la tradiciaj salutparoladoj. Oni povas fari je tiu okazo du konstatojn, unue ke la unueco de la elparolo tute ne estas tiagrado, kiel ĝi devus kaj povus esti, kaj due ke la enhavo de tre multaj salutparoloj estas vere tre povra. Malofte oni trovas iun originalan penson aŭ provon tiom individue turni la salutojn aŭ amplekti iun aktualan sciigon. Se iu havas nenion alian por diri ol „Mi havas la honoron saluti la kongreson en la nomo de xy-lando kaj mi deziras al la kongreso bonan sukceson“, li same bone povas nenion diri. Se la aperigo de la disko donas la ekeston de iu nova formulo por rompi la monotonecon de la nur tro tradiciaj sa-

lutparoladojn en niaj Universalaj Kongresoj, ĝia aperigo estus ankoraŭ pli valora ol ĝi jam estas el dokumenta vidpunkto.

A. E.

Internacia Polica Ligo Esperantista

Nia konata samideano Aŭgust Weide, Polica Konsilisto, Hamburgo-Altona, Eggerstedtstr. 41, Germanujo, sendis al ni la unuan bultenon pri la nomita ligo. Ĝi enhavas jam la nomojn kaj adresojn de 100 policistoj en 19 landoj. S-ro Weide petas, ke interesiĝantaj policistoj anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ĉe li por ke oni povu fondi la nomitan Ligon, kiu fariĝu sekcio de U.E.A. En la 1-a bulteno S-ro Weide esprimas kelkajn ideojn pri la venonta laboro kaj petas la adresojn de policistoj esperantistoj.

Nova prospekto de la Lötschbergfervojo

Nur du jarojn post la aperigo de ĝia sukcesplena granda prospekto en Esperanto la fervoja societo Bern-Lötschberg-Simplon aperigis novan tre belan prospekton kun multaj bil-

doj, kiu same utiligas Esperanton. La dekpaĝa prospekto priskribas la faman transalpan Loetschberglinion kaj estas presita en la lingvoj angla, itala, hispana kaj Esperanto. Oni povas havigi ĝin al si ĉe Informservo de BLS, Genfergasse 11, Bern, Svislando.

Sciigoj

„Pollando“ De tiu revuo ni ricevis la numeron de Jan. '57 tute en Esperanto. Same interesa kaj bela kiel la du antaŭaj en nia lingvo. Ni do devas gratuli la eldonantojn. Ni kompreneble esperas ke multaj esperantistoj volos aboni ĝin. Ĝi estas nepre necesa. Prezo: 3 Usonaj dolaroj. Abonebla ĉe nia instituto.

„Nuntempa Bulgario“. Ni ne ankoraŭ vidis la unuan numeron kaj jam la eldonantoj sciigas ke la unua numero estas tute elĉerpita! Tiel ke ili eĉ demandas al la Bulgaraj esperantistoj mem por rezigni je sia abono! Ŝajne venis amase la mendoj el la Orient Eŭropaj landoj. Despli bone. Tamen estus bedaŭrinde se neestus kvanto je dispono de la Okcident-Eŭropaj landoj.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

(Sekvo de p. 27)

zentis belan paro'adon pri „Ludwig van Beethoven” en kiu ŝi interese skizis la vivon kaj la verkojn de tiu grandmajstro de la muziko. Kelkaj eltirajoj el la aluditaj verkoj estis disaŭdigataj per altfidelecaj diskoj.

Dimanĉe, 7an, dekopa de'egitaro veturis per du aŭtomobiloj, bonvole gvidataj de S-ino S. Verbeke kaj de F-ino M. L. Verbaes, al la jubileaj festoj de la Brusela Grupo. Pri tiu partopreno estis detale raportata dum la kunveno de la 9a.

Debato pri la temo „Ĉu virinoj devas aŭ povas soldatiĝi” plenigis la duan parton de la kunveno de la 16a, dum kiu ankaŭ estis decidata grupa vizito al la florekspozicio „Brugaj Floraloj”, vizito kiu okazis jaŭdon 18an, je la 18 1/2-a, kun pli ol tridek partoprenantoj.

Sekcio de Sint-Michiels :

Ankaŭ tiu sekcio de la Bruĝa Grupo restis aktiva. La 1an de aprilo estis donata la lasta leciono de la elementa kurso gvidita de S-ro R. Behaeghel, kiel daŭriganto de S-ro R. Lagast, nuntempe soldato. La grupa prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, gratulis la gelnrintojn kaj dankis la kursgvindinton. La 15an okazis tie la ekzameno pri simpla kapableco.

Programo de la venontaj kunsidoj:

1e: La unuan kaj la trian lundon de ĉiu monato, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels: Perfektigaj kunvenoj de la sekcio sub gvidado de S-ro R. Behaeghel.

2e: ĉiumarde: je la 8a vespere, en la **so-mera kunveno** „CONCORDIA” Zuidzandstraat 5, (Tel. 366.24):

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: leci-

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuoj en la tuta lando. Tel. 371.93
 Charcuterie Strovi, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
 Maison Joye, Gelmuntstr. 29. Cemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
 F-ino G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
 Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj 18.77.67
 Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
 Farmaciisto N. Nellis, Meise 59.13.73
 „BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
 Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
 CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe 21.74.49
 Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
 Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
 Tinkturejo, senmakuligejo „TEX” 11, Av. du Couronnement, Woluwe St. Lambert 70.75.82

ono de la elementa kurso.

Dum la dua horo:

Majo: la 7an: Raporto pri la kermesa foiro: la 14an: Parolata gazeto; la 21an: Parolado de S-ro R. Behaeghel pri „Astronomio”; la 28an: Legado de B.E.

Gratuloj

Al F-ino Albertine BALLEGEER, membrino de la Bruĝa Grupo, kiu edzinigis kun Leŭtenanto Omer Roets (13.4.57).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero : 12.30.48)

La 25an de februaro S-ino Castel kaj S-ro Swinne prizorgis la aranĝon de mitulvespero, kiu bonege sukcesis kaj dum kiu, por fini, ĉiu laŭvice rakontis amuzajn historiojn.

La 4an de marto okazis, en la renovigita kunveno „Brasserie de la Justice”, parolata ĵurnalo, dum kiuj la membroj estis informatataj pri la grava malsano de plej fidela membrino F-ino Kestens kaj pri la morto de S-ro Vermandere (Antverpeno). Akiris la premiojn de la ĵurnalo: F-ino Obozinski por sia legita, kaj S-ro D. van der Stempel, por sia tradukita teksto „Monte-Karlo kaj la Ruleto”, kiu estis elektata por eventuala diskuto.

La 11an, S-ino Daems lerte kaj klare prelegis pri la temo „Ĉu la eventoj en Hungarujo estis antaŭvideblaj?” Kiel eble objektive, ŝi pritraktis tiun ĉi gravan kaj ampleksan klarigon, kiu estis sekvata de diversaj komentarioj kaj interparoloj; Ŝi akiris varman aplaudon.

La 18an, S-ro van der Stempel donis sian perfektigan kurson pri frazkonstruo, legosignoj, reciproka senco, k.t.p., kaj la konversacia parto temis pri la kuirejo kaj la manĝilaro.

Programo de la sekvontaj kunvenoj

Ĉiulunde, je la 20a h „en „Brasserie de la Justice” (1-a etaĝo), Pl. du Grand Sablon 28, Grote Zavel (Tel. 12.64.76).

Majo: La 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: S-ino R. Jacobs prelegos pri „La Dormo”; la 20an: Perfektiga kurso de S-ro Van der Stempel; la 27an: Vespere, gvidota de S-ino STERN.

Junio: la 3an: Parolata ĵurnalo; la 8an, 9an, 10an: Beneluksa Kongreso; la 17an: Raporto pri tiu ĉi Kongreso.

CHARLEROI

Karloriga Grupo

Plezure ni sciigas ke la jaro 1957a vidis la revigligon de la Karloriga Grupo. La varbado de pluraj novaj membroj postulis malfermon de kurso. Tiu ĉi estas atente aŭskultata. Kunvenoj regule okazas ĉiujn mardojn. La 2-an de aprilo, la Grupo inaŭguris novan kaj taŭgan ejon, intence oni elektis ĝin sufiĉe granda, ĉar oni antaŭvidas ankoraŭ aliajn novulojn. Efektive la estraro baldaŭ zorgos pri diversaj projektoj, kiuj donos, ni esperas, antaŭenpuŝon al la Grupo.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.